**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

N-ro 42/1974 4 dec 1974
Aperas ĉiusemajne

15a de decembro
Naskiĝtago de
d-ro Zamenhof

*******

Tago de la
Esperanto-
LIBRO

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 463649; 514269

GEA-estrarkunsido

Lüdenscheid (pp-ebo) Kiel ni jam anoncis, la 23 kaj 24 nov 74 la estraro de Germana Esperanto-Asocio kunsidis en Lüdenscheid dum 10 horoj. La estraro konstatis, ke la esperantistoj en FR Germanio plulaboras sen maltrankviliĝo, en la enlanda movado kaj en la kadro de Universala Esperanto-Asocio, post la Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo.

El la faritaj decidoj ni mencias:

1) En 1975 GEA eldonos novan varbbroŝuron, nome tiun de la itala socialdemokrata partio, kiu jam estas tradukita en germanan lingvon. Komence de la venonta jaro ĝi estos sendita kun akompana letero neŭtrala al eminentuloj, kiuj estas membroj de la samtendenca partio.

   Krome GEA eldonos 1975 faldfolion en germana lingvo en granda kvanto.

2) GEA intencas plivastigi la Esperanto-laborojn sur la kampo de ĝemelaj urboj.

   GEA daŭrigos la kunlaboron kun e e c (eŭropa esperanto-centro) en Schoorl, Nederlando.

3) La estraro aprobis la planon de esperantistoj en Hamburgo aĉeti kaj funkciigi kulturdomon en Nordgermanio.

4) Oni priparolis la programon por la venontjara Germana Esperanto-Kongreso en Oberkirch. Oni antaŭvidas: podian diskuton pri E - turismo, fak-kunsidojn, jarĉefkunvenon, ekspozicion, balon, ekskurson ktp.

5) Grava punkto de la kunsido estis la budĝeto 1975 kaj bilanco 1974. La financa stato estas relative bona kaj ankaŭ la enpagado de kotizoj, tial GEA havas la necesan monon por siaj multaj aktivecoj.

*************

Esperanto-Societo Paderborn fondita

Paderborn (pp-hb). La jam delonge planita fondiĝo de la "Esperanto-Societo Paderborn" okazis la 25 nov 1974 en la restoracio "Bareleto' la Esperanto-restoracio de Paderborn. La kunvenon ĉeestis multaj interesuloj el Paderborn, Elsen, Salzkotten, Borchen kaj Neuenbeken. Post la diskutado de la societaj statutoj estis elektita jena estraro: Akad. Oberrat Dr. Hans Kasselmann, prezidanto
stud. paed. Karl Trimborn, vicprezidanto
Hermann Behrmann, sekretario
S-ino Traute Lawerino, kasisto.

Unu el la unuaj gratulantoj estis restoraciestro Gijsbert Roos kune kun la edzino Doris.

Nova Esperanto-kurso

Paderborn (pp) 16 gelernantoj de la reallernejo Rietberg propra-iniciate formis studgrupon por lerni Esperanton laŭ la lerno-libro "Wir lernen Esperanto". Ilia instruisto Guido Dignas donas la necesajn konsilojn.

## Novaĵoj pri la 60a Universala Kongreso de Esperanto

Kopenhago/Roterdamo (pp) Aperis n-ro 3 de la Oficiala Komuniko, el kiu ni citas:

### Novstila programo?

Laŭ iniciato de la nova Estraro de UEA, ĝia komisiono pri kongresoj kaj konferencoj komencis viglajn opini-interŝanĝojn pri la programo de la Universalaj Kongresoj. Kvankam la rezultoj de tiuj diskutoj evidentiĝos nur en pli longa perspektivo, jam aperis nombro da interesaj ideoj, kaj tre verŝajne jam en Kopenhago respeguliĝos la nova gvidlinio: "eksperimenti kaj diversiĝi".

### Prof. Neergaard - Rektoro de ISU

Profesoro Paul Neergaard, internacie konata specialisto pri plantoj, direktoro de la Dana Instituto de Sempatologio por la Evolulandoj kaj vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, akceptis ofici kiel Rektoro de la venonta sesio de la Internacia Somera Universitato.

### Aliaj novaĵoj

Kvankam ankoraŭ ne definitivaj, jam ekzistas skizoj pri la vojlinioj de du tuttagaj ekskursoj por partoprenantoj de la 60a UK. Unu kondukas la vojaĝantojn trans la markolon al Svedujo kaj tra la sveda regiono Skanio, dum la alia celas al Fredensborg en Nordselando, Danio.

La 43a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazos en Hillerød, Danlando, de la 20 ĝis 26 de julio 1975, tuj antaŭ la UK en Kopenhago.

La 15a Internacia Infana Kongreseto okazos en la Internacia Lernejo kaj Infanvartejo de Bjørn, en Hellerup, sub gvido de s-ino Karen Bjørnsby, kiu estris la unuan kongreseton en 1956.

Ĝis la 26 nov 1974 aliĝis al la UK 196 personoj.

### Atentu la limdaton!

Se vi ne jam aliĝis al la jubilea Universala Kongreso, atentu bone, ke la kotizo plialtiĝos post la 31a de decembro 1974. Do, aliĝu tuj!

***************

## 31a Internacia Junulara Kongreso en Fredericia

Fredericia (pp) La 31a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos de la 19a ĝis la 26a de julio 1975 en la dana urbo Fredericia sub la temo "Kultura interŝanĝo".

Jen la aliĝkotizo ĝis

| Personoj | 31.1.75 | 31.3.75 | 30.6.75 | en julio |
|---|---|---|---|---|
| Ĝis 19jaraj | 250 | 275 | 300 | 325 dkr. |
| 20-24jaraj | 275 | 300 | 325 | 350 dkr. |
| 25-29jaraj | 300 | 325 | 350 | 375 dkr. |
| pli ol 30jaraj | 325 | 350 | 375 | 400 dkr. |

La supraj sumoj validas por individuaj membroj de TEJO; ne-membroj pagas aldonajn 25 dkr.

La kotizon oni sendu al TEJO-kongreso 1975, Thunogade 26-4, DK-8000 Aarhus C, Danlando, poŝtĝirkonto n-ro 26 62 67
Aliĝilon oni sendu al la korespondadreso de IJK 75: Internacia Junulara Kongreso, Christian Lauridsen, Østergade 43, DK-7430 Ikast, Danlando.

## SEL ne plu suborganizo de GEA

Saarbrücken (pp) Dum sia membrokunveno en Saarbrücken Sarlanda Esperanto-Ligo kun la plimulto de la voĉoj akceptis jenajn proponojn:

1) Kiel memstara Esperanto-Ligo SEL ne plu estu ekde tuj suborganizaĵo de Germana Esperanto-Asocio;

2) SEL ne plu peru membrecojn al Germana Esperanto-Asocio.

## Kunvenoj okaze de la 15a de decembro

Opladen (pp) La fervojistoj-esperantistoj de la fervojaj direkcioj Köln kaj Essen aranĝas Zamenhof-feston, dimanĉe, la 15 dec 1974, je la 14,30 horo en Opladen, Kantine de Ausbesserungswerk. Ĉiuj esperantistoj kaj interesuloj kun familianoj estas bonvenaj. S-ro Barnickel, Frankfurt, montros sian filmon pri la IFEF-kongreso en Tarragona.

Stuttgart.(pp) La Zamenhof-festo de la Esperanto-grupo Stuttgart okazos sabaton, la 7 dec 1974, ekde la 18a horo, en Stuttgart, Hotelo "Herzog Christoph", Büchsenstr. 37.
Drago Smoliĉ montros la unuan fojon sian kolorfilmon pri la "59a Universala Kongreso de Esperanto 1974" en Hamburgo.

München. Pri la Esperanto-kunveno en München ni jam raportis en la lasta numero. Nun atingis nin la invito kun la programo:

10a horo **Aktualaĵoj el Bavarujo**
Diskutado pri aktualaĵ Esperanto-problemoj en Bavarujo, daŭrigo de la Bamberga diskutado

12a horo Tagmanĝo

13,30 horo **Solenaĵoj**
Lumbildprelego de Ludwig Thalmeier, Landshut
Teatraĵo de Michael Aúdibert, Parizo
Distraĵoj de E-grupo Pfaffenhofen, Josef Weidacher k.a.

Loko kaj tempo: Hotel Arnulf (Landshuter Hof), München, Arnulfstr. 12, vid-alvide al la norda elirejo de la ĉefstacidomo. Sabate, 14.12.74

Mannheim. Atingis nin nun ankaŭ la programo por la Zamenhof-festo en Mannheim, sabate, la 14.12.74, je la 15a horo ĉe Carl-Duisberg-Gesellschaft, Mannheim, Tattersallstr. 39.
El la programo: Eŭropa Feriosemajno en Svislando - Esperantofilmo de Arthur Benders
Libroj, kiujn posedu ĉiu E-amiko - instigoj por E-biblioteko de Manfred Karch
Parolas Varsovio, naskiĝurbo de Esperanto - Radio-elsendo el Varsovio
Nia lando, la GDR - Esperanto-filmo de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR.

## Zamenhof-festo en Osnabrück

Osnabrück (pp) Jam la 10an de novembro 1974 okazis Zamenhof-festo en Osnabrück en ĉeesto de ĉ. 40 personoj, inter ili esperantistino el Pollando. Hermann Behrmann prelegis pri"Esperanto en Paderborn".

Silvestra balo en Paderborn: La enirprezoj por la granda silvestra balo en Paderborn (vd. PP 41/74 p.1) estas jenaj: Membroj de la Eŭropa Klubo 3,- DM, ne-membroj 8,- DM; paroj pagas 5 resp. 15 DM

## Nova konkurso de Pola Radio

Pola Radio anoncas jenan novan konkurson:

1) Bonvolu mencii konatajn al vi atingaĵojn de polaj sportistoj (sportbranĉojn, nomojn, rezultojn ktp.)
2) Kiujn polajn sportajn atingaĵojn vi opinias la plej gravaj kaj kial?

Respondo al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en la lotado de la premioj: 10tagaj ekskursoj tra Pollando, valoraj objektaj premioj.

La respondojn oni sendu al Pola Radio, PL-00-950 Warszawa, P.O.Box 46, Pollando, en kovertoj signitaj per la devizo "Konkurso" ĝis la 31a de decembro 1974.

La rezultojn de la konkurso oni anoncos en la disaŭdigoj de la Pola Radio la 31an de januaro 1975.

***************

## Ekspozicio de E-gazetoj en Bydgoszcz

Bydgoszcz, Pollando, (pp) De la 21 - 25 novembro 1974 okazis en Bydgoszcz, ekspozicio de Esperanto-gazetoj sub la titolo "85 jaroj de Esperanta Gazetaro". La kolekto de 90 gazetoj, kiun faris Roman Wiktor Rutkowski, estas citita en malgranda katalogo. En ĝi oni nomas ankaŭ Pilo-Press.

## Salutojn de A. Masuhr

Nairobio (pp) Adalbert Masuhr, Elmshorn, nuntempe vojaĝanta tra Afriko al Novzelando skribas sur pk de la 74-11-26 el Nairobio en Kenio: "Mi informas vin ke mi jam atingis mian 22an landon dum mia vojaĝo kaj la 76an en mia vivo. Mi hodiaŭ bone ricevis Pilo-Press N-ron 37/74, ankaŭ Heroldon de Esperanto de samideano Hans Schütt el Hamburgo kaj ĉion kun intereso legis."

## Radio Pekino skribas

"Kara amiko! Alproksimiĝas la jaro 1975, en bonega situacio tra la tuta mondo. Je la nova jaro, ni adresas al vi, viaj geparencoj kaj geamikoj elkoran gratulon kaj intiman saluton. Ĉi tie ni ankaŭ esprimas al vi nian sinceran dankon pro via inspiro kaj subteno al nia laboro.
Nun ni sendas al vi la kalendaron 1975-jaran, bonvolu ĝin akcepti kiel memoraĵon! En la kalendaro ni presigis ĉinstilajn pentraĵojn kaj gravuraĵojn, kaj sur la kovrilo vi vidos ĉinstilajn bildojn, pentritajn de kamparanoj el Huhian-gubernio, Ŝenhi-provinco de nia lando.
En la venonta jaro, kara amiko, ni esperas, ke vi daŭre aŭskultos nian disaŭdigon de Esperanto kaj ofte skribos leterojn al ni, por ke la amikeco inter ni kaj vi floradu por ĉiam. Ni tre ĝojos, se vi multe elmetos valorajn opiniojn por plibonigi nian programon. Bonvolu skribi al ni ricevinte nian kalendaron.
Feliĉan novjaron! Esperanto-sekcio de Radio Pekino"

***************

**Pilo-Press** ĉiusemajna internacia informservo

Jara abonprezo 30 GM, kun germana eldono END 40 GM. Bonvolu pagi vian abonkotizon por 1975 al Ludwig Pickel, D-85 Nürnberg 1, Postfach 2113, PSchK Nürnberg 819 56-851, Stadtsparkasse Nürnberg 1.901.579. Dankon!